

decembro 1970

63-a jaro

n-ro 781 (12)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



La 15-a de
decembro

TAGO DE LA

ESPERANTA LIBRO

Vi trovos

sur la sekvantaj paĝoj, ke la litertipo de via revuo estas de nun 5% pli granda, ol en la oktobra kaj novembra numeroj. Ni esperas, ke tiu ŝanĝeto signifos pli senĝenan legadon por ĉiuj.

Laŭ enhavo nia jarfina numero prezentas miksaĵon el seriozaj diskutoj pri la internacia vivo ("Kien iras Unesko?" kaj "Kiel eblas vera libereco de informado?") kun movadaj temoj, novaĵoj kaj leteroj. Al TEJO ni disponigas denove 2 paĝojn (192-193) por artikolo, kiu sendube intereso ne nur junulojn.

La indekson de la tuta jarkolekto 1970 vi trovas ĉi-foje presita sur la finaj paĝoj, kie ĝi restas neforprenebla kaj sekura kontraŭ la kapricoj de eraremaj bindistoj.

Enhavo

- 181 Kiu helpos pruvi, ke $100 \times 100 = 10\,000$? (Lapenna)
- 182 Novaj progresoj en Estonujo
- 182 Dua TV-kurso preparata
- 182 Lingva rivaleco en Eŭropo
- 183 Kien iras Unesko? (Lapenna)
- 184 Kiel eblas vera libereco de informado? (Pancer)
- 186 Bilanco de la pupteatraj festivaloj (Bagger)
- 186 Aldonaj faktoj pri Zamenhof'oj (Dratwer)
- 186 Kial JAL surmariĝis?
- 187 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 188 Loke — Fake (mallongaj novaĵoj)
- 188 Infanoj kongresos apud la maro (Infana Kongreseto 1971)
- 189 56a Universala Kongreso, Londono, 1971
- 192 Skoltismo kaj Esperanto (TEJO-paĝoj)
- 194 Leteroj de legantoj
- 194 Antaŭ 50 jaroj — en "Esperanto"
- 195 Esperanto en radio
- 195 Nekrologoj: Minnaert, De Cock, Leck
- 195 Elekto de komitatanoj B
- 196 Oficiala informilo n-ro 440
- 197 Anoncetoj

La kovrilo

Aĉetu, fraŭlino Aĉetu kaj legu!

Por stimuli la ekonomion de la Esperanta literaturo, Julio Baghy iam proponis (kaj la plimulto jam akceptis kaj agnoskas), ke la 15a de decembro, la naskiĝtago de L.L. Zamenhof, estu samtempe "Tago de la Esperanta Libro", en kiu ĉiu havas la moralan devon aĉeti, legi, aŭ aĉeti kaj legi unu Esperantan libron. La literaturo estas la spino de la lingvo — kaj regula legado estas la fundamento de bona vortprovizo kaj bonstila lingvouzo.

Kiam ĉi tiu gazeto atingos la legantojn ekster Eŭropo, la 15a de decembro estos jam pasinta. Sed ne estos tro malfrue por observi la admonon de Baghy kun ioma prokrasto, se vi tion ne faris jam je la fiksita dato. Kiu scias? — eble la legado fariĝos jam kutimo!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭ-lío kaj N-Z. 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Us., Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. = 285 gld., ½ p. = 150 gld.; ¼ p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝkostoj ekstre. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Grafisch Bedrijf Tuijtel, Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Bliesskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G.

Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, F.R. Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17e, Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: J. Uśpieński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Kiu helpos pruvi, ke

$$100 \times 100 = 10\,000 \quad ?$$

Ni ne estas kompetentaj por skribi pri la ekonomiaj problemoj de la mondo. Specialistoj eble komprenas ilin; ĉiu sentas iliajn efikojn. Necesas tamen diri ankoraŭfoje, ke la ekonomia kaj financa aŭtarcio en pluraj landoj, gravaj limigoj de internaciaj transpagoj, kreskanta inflacio kaj konstantaj krizoj kaŭzas seriozajn malfacilaĵojn al ĉiu internacia organizaĵo, kies financa bazo estas la kotizoj de la membraro.

La kotizoj ne altiĝos

Dum la tuta postmilita periodo, precipe en la lasta jardeko, UEA suferis pro tiuj eksteraj neregeblaj cirkonstancoj. El tuta aro da landoj oni ne povas senlime sendi kotizojn al la C.O., nek aĉeti librojn de ĝia libroservo, nek kontribui por diversaj celoj. Aliflanke, prezoj kaj salajroj daŭre altiĝas, kaj la mono ĉiujare perdas sian valoron.

Por iel ekvilibrigi la enspezojn kaj elspezojn, la Komitato de UEA sentis sin devigita iom altigi la kotizojn dum la Universala Kongreso en Helsinki (1969). Kompare kun similaj devigaj altiĝoj de kotizoj en aliaj organizaĵoj kaj de abonoj por diversaj periodaĵoj, inkluzive Esperantajn, la kotizoj de UEA plu restis tre modestaj eĉ post la altiĝo. Samtempe la Estraro, en kunlaboro kun la direktoro de la C.O., faris drastajn reduktajn de elspezoj. La aĉeto de propra ofseta presejo (ĝis nun estas aĉetitaj la kompostilo kaj la fotoaparataro, dum la presilo estas aĉetota) nun ebligas ŝparon de kelkaj dekmiloj da guldenoj, kvankam la nombro de paĝoj de "Esperanto" estas pligrandigita. Rezulte, malgraŭ la plia altiĝo de la prezoj inter aŭgusto 1969 kaj aŭgusto 1970, en Vieno ni povis eviti novan altigon kaj tamen esperi, ke la Asocio ne havos deficiton en la venonta jaro.

Ĉio ŝajnis en bona ordo. Nun venas malagrabla sciigo: ekde la 1-a de februaro la afrankoj en Nederlando altiĝos je 30% kaj aliaj prezoj je 5-10%. Ĝuste pro la transpago de preslaboroj en la propran oficejon, la prezaltiĝo ne multe influos la elspezojn, sed la nova afranko kaŭzos elspezon de ĉ. 10 000 guldenoj.

Kion fari?

Kvar estraranoj, kiuj partoprenis la Italan Kongreson de Esperanto fine de septembro (s-roj Carlén, Wensing, Woessink kaj la subskribinto) detale pridiskutis la situacion surbaze de realeca raporto de d-ro Sadler. Ni estis firmaj kaj unuanimaj en nia starpunkto, ke la kotizoj devas resti la samaj kiel en 1970. *Do, nepre neniam kotizaltiĝo.* Tiun starponton dividas ankaŭ la aliaj kolegoj en la Estraro kaj verŝajne la tuta Komitato. Tamen, de ie oni devas trovi almenaŭ 10 000 pliajn guldenojn. Minimume, ĉar ankaŭ la gravega eldonaĵo La Monda Lingvo-Problemo (LMLP) frontas malfacilaĵojn.

di la Jarlibron por 1971 kiel eble plej frue, kaj tiel parte eviti la altigotan afrankon (prizorgos la C.O.); (ii) havigi al ni pliajn plurmonatajn reklamojn de gravaj entreprenoj (prizorgos s-ro Wensing); (iii) havigi al ni donacojn kaj subvenciojn de organizaĵoj, institucioj kaj unuopuloj ekster UEA (prizorgos s-ro Woessink kaj la subskribinto); (iv) intensigi la varbkampanjon por havigi al la Asocio kiel eble plej multajn individuajn membrojn (alvoko al ĉiuj); (v) prepari, por ĉiu okazo, rezervan buĝeton kun limigitaj elspezoj, kio, tamen, implicus rezignon pri iuj nunaj agadoj (prizorgos la direktoro kaj s-ro Woessink).

En la diskuto s-ro Carlén starigis la demandon, ĉu fakte ne troviĝas en la tuta UEA nur 100 personoj, kiuj povas kaj volas devontigi sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 la sumon de 100 guldenoj *aldone* al la jam pagataj ordinaraj kotizoj kaj eventualaj kontribuoj al diversaj fondaĵoj de la Asocio. La menciitaj 4 estraranoj fidis, ke tio estas ebla, kaj tuj devontigos sin ne nur por helpi, sed ankaŭ por doni ekzemplon.

Nun, komisiita de miaj kolegoj kaj en mia propra nomo, mi turnas min al nia vasta membraro kun la peto kaj alvoko sekvi nian ekzemplon. Verŝajne troviĝas eĉ pli ol 100 personoj, kiuj ne sentos tre forte tiun ekstran elspezon en sia buĝeto. Se tiel, do ĉiu plia sumo, post la kovro de la bezonataj 10 000 guldenoj, iros al LMLP por fortikigi ĝian pozicion.

La personoj, kiuj deziras partopreni en la pruvado, ke 100 X 100 efektive egalas al 10 000 en tiu ĉi kazo, bv. sin anonci al la C.O. de UEA kun samtempa pago de la unua donaco de 100 guldenoj por la jaro 1971, ĉu al la C.O. rekte, ĉu al la ĉefdelegitoj kaj perantoj.

S-ino Carlén, la edzino de nia vicprezidanto, promesis klopodi en tiu senco ankaŭ ĉe siaj gekonatoj ekster la Esperanto-Movado. Kial ne imiti ankaŭ ŝian ekzemplon?

Aliaj sugestoj

Ankaŭ la membroj, kiuj ne povas aŭ ne deziras partopreni en tiu ĉi speciala agado, tamen espereble helpos diversmaniere, ekzemple per tuja pago de sia kotizo; altiĝo de sia membrokategorio al Membro-Subtenanto aŭ eĉ al Patrono; varbado de novaj individuaj membroj; pruntoj aŭ donacoj al Fondaĵo Hodler; donacoj al CED aŭ, aparte, al LMLP, al Fondaĵo Canuto (kotizoj por MA en landoj kun limigitaj eblecoj de transpago), al difinitaj aliaj celoj, ekzemple por la oficeja ilaro, aŭ al la ĝenerala kaso; heredaĵoj.

Efektive, multnombraj estas la eblecoj por helpi finance, se oni povas kaj deziras.

*

Oni komprenu bone: tio ĉi ne estas ia helpokrio por savi dronanton. UEA ne dronis nek dronos. Ĝi estas

IVO
LAPENNA

Nia Respondo

Post detala preparado de la afero, ni decidis (i) ekspe-

NOVAJ PROGRESOJ EN ESTONUJO

Ke instrui Esperanton en la oka klaso de lernejo estas permesite de la Ministerio de Klerigo de la Estona S.S.R., estas jam raportite en la decembra numero precize antaŭ unu jaro. Ĉi-foje la Ministerio permesis enkonduki Esperanton kiel fakultativan lernobjekton ne nur en la oka, sed de la oka ĝis la dek-unua klasoj, po unu leciono semajne (t.e. 35 lecionoj jare). La Ministerio sendos al regionaj klerigaj fakoj oficialan sciigon pri Esperanto kaj la programon.

Dua novaĵo estas: Kiel oni povas legi en la novembra numero (p. 178), Estona Radio dissendas en Tallinn, ĉiumonate unu fojon, programon en Esperanto kun kelkaj svedlingvaj klarigoj por Svedujo. La unuafoja dissendo okazis en la 23-a de septembro je 22.05 MET (Mez-Eŭropa Tempo) per ondoj 290 m kaj 49,3 m kaj la sekvantaj okazas en ĉiu antaŭlasta vendredo de monato en la sama tempo kaj per la samaj ondolongoj dum 15-20 minutoj.

Trie, en Tallinn estas kreita la unua fabrika Esperanto-klubo en Estonujo (kaj en Sovetunio). Ĝi laboras oficiale ĉe la fabrika sindikata organizaĵo kaj ricevas financajn rimedojn de la sindikato kaj la ejon kaj aliajn agrimedojn de la fabriko.

Kvare, Estona Ŝtata Eldonejo prenis en la eldonplanon eldoni ĉiujare po unu esperantlingva libro el la plej bonaj literaturaj verkoj de estonaj verkistoj. La unua aperos en 1971: "Noveloj" de Lilli Promet. Kaj baldaŭ sekvos la eldono de granda Esperanto-estona vortaro, kies redaktoro estas Lembe Hallop.

Kiu helpas pruvi, ke $100 \times 100 = 10\,000$?

(daŭrigo de p. 181)

kaj restos forta malgraŭ la eksteraj cirkonstancoj, kiuj ĝenas ĝian laboron. Tio ĉi estas alvoko direktita al ĉiuj, kiuj aprezas la gravecon de nia komuna UEA por la progresigo de la Internacia Lingvo kaj kiuj tial pretas fortikigi ĝian financan bazon, por ke ĝi povu ankoraŭ pli efike plenumadi sian rolon.

Nia celo certe ne estas, nek iam estis, "varbadi novajn membrojn" aŭ "petadi monon", *sed multnombra membraro kaj minimuma financa bazo ja estas antaŭkondiĉo por realigado de ĉiuj taskoj kaj etapaj celoj kondukantaj al la celo*: la venkigo de la Internacia Lingvo en la mondo. Kaj por tiu celo la Asocio sendube bezonas la helpon de ĉiuj.

Ivo Lapenna

Dua TV-kurso preparata

La Slovaka Televido preparas elsendi kurson de Esperanto. Ĝi kunlaboras kun Asocio de Esperantistoj de Slovaka Socialisma Respubliko kaj antaŭvidas fini la produktadon de materialoj iam en 1971.

La decido de la Slovaka Televido en Bratislava estas sendependa de la pli frue anoncita iniciato de la nederlanda instanco TELEAC. Tamen la fakto, ke okazos televida kurso ankaŭ en orienteŭropa lando, certe plifortigas la argumentojn de ĉiuj, kiuj klopodas utiligi la nunan favoran konjunkturon por okazigi televidan instruon de Esperanto en pliaj landoj. La slovaka kurso konsistos el 12 lecionoj enhavantaj bazan gramatikon, scenetojn kaj ekzercojn. En la kadro de tiuj lecionoj la reĝisoroj utiligos filmojn kun Esperanto-komentario el Soveta Unio, Pollando, GDR kaj Slovakujo mem.

Lingva rivaleco en Eŭropo

Ŝajne la rivaleco inter nacilingvoj estas pli profunda, ol oni supozas.

Lastatempe la franca registaro komencis klopodi por efektivigo de sia reformo rilate al edukado. La plano estas, por iom malŝarĝi la francajn liceanojn de la peza lingva lernado, liberigi ilin de la devo lerni duan fremdan lingvon. (Nuntempe la liceanoj devas eklerni la unuan fremdan lingvon je la aĝo de 11, kaj la duan je la aĝo de 13.)

Unue reagis enlande la instruistoj de fremdaj lingvoj per strikoj, timante perdi siajn oficojn, kaj lingvistoj per tumulto. La dua reago venis de neatendita direkto: la registaroj de Italujo, Hispanujo kaj F.R. Germanujo.

La argumentoj de la reagintoj estas: 1) Se oni ne devigus la lernejanon alpreni duan lingvon, almenaŭ duono de ili forlasus ĝiajn kursojn, kaj, ĉar pli ol 80% de la liceanoj de Francujo elektas nuntempe la anglan kiel sian unuan fremdan lingvon, la angla fine gajnus absolutan pozicion. 2) Se la francoj lernus nur la anglan, povus facile okazi, ke iliaj najbaroj (italoj, germanoj, hispanoj) ĉesos lerni la francan preferante la anglan, kaj, sekve, la franca ne plu funkcios kiel internacia lingvo en diplomatio ktp.

Cetere oficistoj de la Ministrejo pri Eksterlandaj Aferoj de Italujo jam rimarkigis, ke la reformo konflikta kun la spirito de la ekzistanta franc-itala kultura kontrakto, kiu stimulas ambaŭ landojn plifortigi la uzadon de la lingvo apartenanta al la alia lando. Ili aludis ankaŭ tion, ke la franca lingvo eble ĉesos esti la ĉefa fremda lingvo en italaj lernejoj.

Kien iras Unesko ?



**IVO
LAPENNA**

London, la 12-an de oktobro komenciĝis en Parizo la 16-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. La Sekretariato antaŭvidis, ke ĝi finiĝos sabaton, la 14-an de novembro, kaj la Plenuma Komitato entreprenis diversajn paŝojn por rapidigi la laboron. Inviton al tiu ĉi Sesio ricevis 125 Ŝtatoj-Membroj, 3 t.n. Asociiĝintaj Membroj, 7 Ŝtatoj-Nemembroj, la reprezentantoj de UN kaj de dudeko da specialigitaj organizaĵoj en la familio de UN, trideko da aliaj interŝtataj organizaĵoj kaj 181 neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko en kategorioj A aŭ B. Inter ili troviĝas ankaŭ Universala Esperanto-Asocio, kies observantoj s-roj J. Thierry aŭ A. Bourdeaux nun ĉeestas parton de la kunsidoj. La dokumentaro por tiu ĉi Sesio ampleksas plurajn centojn da paĝoj. Necesis multaj horoj nur por supraĵe trarigardi tiun abundegan materialon.

En sia nuna konsisto Unesko fariĝis preskaŭ universala, sed aliflanke en la lasta jardeko ĝi ĉiam pli kaj pli burokratiĝis. El la nunaj 125 Ŝtatoj-Membroj la plimulto apartenas al la t.n. evoluantaj landoj, kaj tio donas stampon ankaŭ al la laboro de la Ĝenerala Konferenco. Efektive, tiuj ŝtatoj ludas multrilate decidan rolon en la Ĝenerala Konferenco, ĉar ili havas la plimulton de ĉiuj voĉoj.

Riproĉoj al la laboro de Unesko aŭdiĝas de diversaj flankoj. Oni rimarkigas, ke Unesko ĉiam malpli plenumas sian originalan taskon. El siaj limigitaj rimedoj ĝi dediĉas tro multe por helpi la evoluantaj landojn, tiel ke restas preskaŭ nenio por fronti la gravajn kulturajn problemojn de la mondo kaj por ludi la rolon de iniciatanto en la evoluigo de la scienco kaj de ĝiaj aplikoj por la bono de la homaro. Laŭ mia opinio, la riproĉo devus esti direktita ne tiel multe kontraŭ la "troa" helpo al la evoluantaj landoj, sed kontraŭ la ofta misuzo aŭ mallerta uzo de la disponeblaj rimedoj por tiu utila celo, kiel ankaŭ kontraŭ la malatento de esence gravaj problemoj en la hodiaŭa mondo, inter kiuj la lingva sendube estas unu el la plej urĝaj.

La manko de efikeco en la laboro de UN, Unesko, FAO kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj fariĝis jam tiel prema, ke UN sentis sin devigita komisi s-ran Lester Pearson, antaŭan ĉefministron de Kanado, kaj Sir

Robert Jackson (Aŭstralio), la konatan specialiston pri la problemoj de evoluantaj landoj, detale esplori la problemon. Ilia raporto rilate efikecon estas tre negativa, kaj ili sugestas radikalajn reformojn.

Multaj kritikoj rilatas al la personaro de la Sekretariato. Oni riproĉas, ke ĝi estas burokrata, sen iniciato kaj emas entombigi novajn ideojn. Siavice, ĝi respondas, ke efektive ĝin minacas intelekta paralizo, sed ke pri la tuta situacio kulpas ne la oficistaro, sed la Ŝtatoj, en kies manoj troviĝas la decidoj pri ĉio, eĉ pri bagatelaĵoj. Por pritrakti la situacion la Direktoro de Unesko kunvokis t.n. rondan tablon. Ĝi konsistis el 22 membroj elektitaj kaj 6 nomitaj de li mem. La partoprenintoj unuanime decidis, ke necesas reformoj, precipe en la direkto de malcentrigo.

Fine, ne nur UEA, sed ankaŭ aliaj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko, estas tre malcontentaj pro la nuna karaktero de la laboro de Unesko en la sferoj de intereso, en kiuj ili aktivas. La koncernaj reguloj aŭ interkonsentoj ne estas observataj. La opinioj esprimataj de NRO — ofte rezulto de multflankaj studoj — estas apenaŭ atentataj de la Sekretariato kaj de la aliaj organoj de Unesko. La NRO kun sidejo aŭ kun reprezentantoj en Londono havis jam kelkajn kunsidojn por preparoli tiun aspekton de la problemoj kaj trovi pli kontentigan solvon. En tiu laboro partoprenis ankaŭ la subskribinto kaj akcentis, ke oni devus reveni al la originala formo de kunlaboro — nome rekte inter la reprezentantoj de ĉiu unuopa NRO kaj la Sekretariato — sen superflujaj perantaj organoj kaj kunvenoj, kiuj nur komplikas kaj burokratigas la rilaton.

Estas tre kredeble, ke ankaŭ la nunjara Sesio de la Ĝenerala Konferenco ne sukcesos trovi solvon por tiu esenca problemoj de efikeco, al kiu estas ligitaj multaj aliaj problemoj kaj problemetoj. Unu afero estas certa: Unesko ne estas tio, kio ĝi devus esti, nek ĝi ludas tiun rolon sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo, kiun ĝiaj iniciatintoj volis doni al ĝi. Nur radikala reformo ne tiom en la strukturo, kiom en la metodoj de laboro, povas reestabli la prestiĝon, kiun ĝi ĝuis en la unuaj jaroj post la fondiĝo.
(Oktobro 1970)

KIEL EBLAS VERA LIBERECO DE INFORMADO?

La ĉi-subajn meditojn pri informado kaj pri la uzo de internacia lingvo en amas-komunikado inspiris al la aŭtoro lia partopreno (kiel delegito de Jugoslavia Esperanto-Ligo) en internacia simpozio pri "Amaskomunikiloj kaj internacia interkompreniĝo", en kiu li prezentis referaĵon pri Esperanto. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj deklaras: "Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo . . ." Sed kiu regas la formadon de la opinioj, kiujn oni rajtas esprimi?

OTON
PANCER

Necesas, ke forpasu iom da tempo, por havi certgrade klaran bildon pri iu ajn problemo aŭ okazintaĵo. Kaj ĉe meditado pri la hodiaŭa situacio en la mondo, en kiu okazas multaj militoj en "periodo de paco", al miaj pensoj venas la 20-jara jubileo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 1968, kaj al miaj okuloj kaj oreloj la kunveno de elstaraj reprezentantoj de la "sepa forto (potenco)".

Estis aŭtune, apenaŭ dekkvar tagojn post la okazintaĵoj de aŭgusto en Ĉeĥoslovakio. En Ljubljana kolektiĝis ĵurnalistoj, laborantaj en redakcioj de gazetoj, de radio kaj televido, universitataj profesoroj, prelegantaj ĵurnalismen aŭ psikologion, kaj multaj aliaj fakuloj pri amaskomunikado, entute pli ol cent personoj el 26 landoj kaj el kvar kontinentoj.

La temo de ilia interparolo estis amaskomunikiloj kaj internacia interkompreniĝado.

Konforme kun la principoj de Montesquieu, jam en la "Deklaracio pri la rajtoj de la homo kaj civitano" de la jaro 1789 oni antaŭvidis ke: "... libera komunikado de penso kaj opinio estas unu el la plej valoraj rajtoj de la homo: ĉiu homo do povas libere paroli, skribi, presi, escepte se li respondecas pro misuzo de tiu ĉi libereco en kazoj antaŭviditaj per difinita leĝo."

Temas pri diversspeca libera opinio, nome pri la filozofia, estetika, literatura, etika kaj politika opinioj kaj pri la ebleco libere informadi pri ili ĉiujn personojn. La libereco de esprimo, laŭ Fernand Terron (Unesko, 1951), devenas de la rajto de homo.

Amasa komunikado okazas, kiam oni publike transigas iun esprimon nerekte kaj unuflanke al dispersita publiko, uzante iun ajn teknikan ilon de disvastiĝo de informoj. Kaj la plej gravaj komunikiloj estas gazetoj, kinematografiaĵoj, radio kaj televido.



Oton Pancer

Laŭ la elstara ĵurnalista Schwoebel (*Le Monde*, Paris): "La rolo de ili (t.e. de amasaj komunikiloj) estas fundamenta, ĉar ili kompletigas la edukadon plenumitan de lernejoj, kaj oni povas aserti, ke la rolo de grandaj fontoj de informado, de gazetoj, de radio kaj televido, estas certigi konstantan edukadon de plenkreskuloj."

Libereco de opinio

Laŭ prof. Fattorello (Roma), ĉu oni transigas novaĵojn aŭ propagandon, ĉu reklamojn aŭ amuzon, tio ĉi okazas en kvar fazoj: unu persono eltrovas kaj tradukas la okazintaĵon, due li transdonas ĝin per certa ilo kune kun sia opinio (starpunkto), trie aliaj personoj akceptas la informon, kaj la kvara fazo estas la efiko de la novaĵo (propagando, reklamo ktp.) sur la amason.

La elekto de la opinio, kiun faras la persono, kiu iniciatis, starigas la demandon de libereco de opinio, kaj ĉi tio eliras el libereco de menso de la homaro ĝenerale. Sekve, bedaŭrinde, kiel nin sciigas Schwoebel en sia konata verko *La Presse, le Pouvoir et l'Argent* (La gazetaro, potenco kaj mono) la amaskomunikiloj, kiuj plialtigas la nivelon de kulturo kaj edukado, povas fariĝi "terura armilo", laŭ Friedmann, ĉar per ili estas eble direkti la individuon psike, por ke ĝi akceptu militon kaj diktaturon.


Nome, kiel nin sciigas la sociologio kaj aliaj sciencoj, en la "politika publiko" okazas tia procezo: ekestas oligarkio, kaj elito de potenco uzas amaskomunikilojn por influi al opuloj, perdintaj sian individuecon kaj fariĝintaj "homoj de la amaso", degradintaj al objekto de amasa konvinkado. El la kvar demandoj, kiujn oni starigas al amaskomunikiloj: kiu diras, kion, al kiu kaj kun kia efiko (kaj kiujn difinis jam antaŭ kvardek jaroj Laswell) ŝajnas la plej grava la unua. Oni ne neglektu, ke "kiu" signifas la opinion de la organizanto, posedanto, aŭtoro kaj redaktoro kaj oficistoj de la koncerna "amaskomunikilo".

El la jam citita verko de Schwoebel oni ekscias, ke en la plejparto de "evoluintaj landoj" la informado estas komerca agado, kaj la mono estas tiu supre menciita "kiu".

Sed ŝtatigado de institucioj por informado ne nepre signifas kontentigan informadon, pro eventualaj burokrataj agadoj, la metodo de elekto de okazintaĵoj kaj temoj, kaj la maniero de informado. Nome oni povas prisilenti gravajn okazintaĵojn kaj opiniojn, aparte tiujn, kiuj ne konvenas al la gvidantoj de la koncerna ŝtato, troigi en informado pri malfacilaĵoj, kiujn oni travivas en aliaj landoj, kaj simile agi. Monopolismo de ŝtato sur kampo de informado tre ofte direktas al neado de libereco de informado.

Ĉu la ŝtato aŭ ŝtata partio cenzuros, kontrolos aŭ inspektos la amaskomunikilojn, aŭ ĉu ili povos esprimi liberajn opiniojn, dependas de la sistemo de la ŝtato, de la (tiam) momenta politika situacio kaj de multaj aliaj faktoroj.

En "libera publiko" devus ĉiu homo havi la eblecon elekti inter faktoj kaj argumentoj, kaj, anstataŭ esti devigata obei al pruvoj de aŭtoritatoj, akcepti la aŭtoritatecon de pruvoj! Schwoebel atentigas, ke "... modernaj esploristoj, pensuloj, juristoj, ekonomiis-



La ĉiam kreskanta produktado de amaskomunikiloj, ankaŭ en la malpli evoluintaj landoj, proporcie kreskigas la potencon de tiuj, kiuj regas tiujn informkanalojn.

toj, filozofoj, ĉiuj ili deklaras, ke vera informado, serioza kaj kompleta, estas esenca kondiĉo de libereco kaj demokrateco en tre evoluinta hodiaŭa socio, samtempe kondiĉo de progreso kaj paco”.

Oni povas aserti, ke internacian komunikadon kaj interkompreniĝadon malhelpas en unua grado: 1) malaltnivela stato de evoluo en multaj landoj, 2) nesufiĉa demokrateco en multaj landoj kaj 3) nesolvita problemo de la uzo de komuna lingvo en internaciaj interrilatoj.

Minimuma bazo por informado

La malriĉeco de granda parto de la mondo speguligas interalie sur kampo de “amasa komunikado”; tri kvaronoj de la homaro, pli precize 75%, t.e. loĝantoj de neevoluintaj landoj en Afriko, Azio kaj Latina Ameriko, ne disponas je minimumaj medioj por informado, kion publikigis Unesko en la jaro 1966. (La minimumo estis: dek ekzempleroj de tagaj gazetoj, kvin radioriceviloj kaj du sidlokoj en kinejoj por ĉiuj cent loĝantoj.) Por disponigi tiun ĉi minimumon estus necese elspezi en la periodo de 15 jaroj entute 3,4 miliardojn da dolaroj, laŭ la antaŭkalkulo de Unesko, farita en 1962, kaj ne ekzistas ia signo de espero por realigo de tia plano.

En unu el tiuj landoj, en Hindujo, laŭ Nair (Instituto por amaskomunikado, New Delhi), multe progresas diversaj amaskomunikiloj, sed tamen ili estas ĝis nun sub la nivelo de la menciitaj normoj de Unesko. Post la liberiĝo de la lando la du plej potencaj ŝtatoj, Usono kaj Sovetunio, klopodas allogi ĝian tre multnombran loĝantaron al siaj “vivmanieroj”. Ekzemple la usona informa servo en la jaro 1967/68 elspezis por tiuj celoj 7,796 milionojn da dolaroj, kaj ĝi interalie disaŭdigadis en la lastaj kvar jaroj meze 63 horojn semajne en la angla lingvo, 7 horojn en la hindia lingvo, kaj po 3,5 horoj semajne en la lingvoj bengala kaj tamila, kaj oni konsideru, ke radio estas la plej konvena amaskomunikilo por lando kun 70% da analfabetoj. Aliflanke ekzemple la sovetaj radio-stacioj Taŝkent kaj Moskvo elsendadis programon por Hindujo, ĉiun tagon po tri horoj en la angla lingvo kaj en

la hindia, kaj en aliaj sep lingvoj de Hindujo po 2,5 horoj tage.

Baldaŭa monda televid-dissendado

Bourquin (prezidanto de la Internacia Asocio por Esplorado de Amaskomunikado, Lausanne) informas nin, ke proksimume en la jaro 1973-a la satelitoj por komunikado ebligos nerekthan transmisiadon de televidaj programoj, kaj ke dek ok jarojn pli poste ĉiu povos rigardi ĉiujn televidajn programojn sen uzo de relajso.

Tiu ĉi ebleco de anstataŭigo de naciaj programoj estos granda progreso, sed en ĝi kuŝas eĉ pli granda minaco flanke de tia “terura armilo” — la amaskomunikilo. Oni konsideru, ke O.W. Riegel (universitato en Lexington) jam en la tridekaj jaroj de tiu ĉi jarcento en sia libro *Mobilizado por kaoso* turnis la atenton de la homaro, ke uzado de amaskomunikiloj por mallarĝaj naciismaj celoj gvidas al neevitebla katastrofo. Kaj en Ljubljana, en sia prelego “Naciismo kaj komunikado” li atentigas la homaron pri novaj faktoroj: nukleaj armiloj, malaperigo de distancoj, fizike, pro granda rapideco de komunikiloj, kaj psike, pro evoluo de elektroniko kaj kiel rezulto de ĉi tio la pligrandiĝo de interligiteco inter ĉiuj homoj kaj kreskado de malpaco en ilia interno. Se ne estos solvitaj la problemoj de ebleco de vera, kompleta, objektiva, rapida kaj libera informado kaj de komuna lingvo, kaj se ankaŭ la estontaj satelitoj por komunikado estos en la manoj de “potencoj”, ankaŭ ili estas uzataj por misinformado, malvarma milito kaj konfliktoj.

Interkompreniĝado kaj forigo de konfliktoj estas eblaj, kondiĉe ke ekzistus raciaj, demokrataj naciaj publikoj.

La strukturo de universala kosmopolita mondo povas elkreski nur surbaze de diverseco, surbaze de memadministrantaj publikoj, de iliaj deziroj, iliaj juĝoj kaj iliaj aŭtonomio kaj suvereneco. Nur tiam la monda publika opinio alproksimiĝos al la konata “morala leĝo” de Locke aŭ “komuna volo” de Rousseau.

BILANCO DE LA PUPTEATRAJ FESTIVALOJ

P. V. BAGGER

La 3-a Pupteatra Internacia Festivalo okazis de la 5-a ĝis la 11-a de oktobro 1970 en Zagreb, Jugoslavio, sub la aŭspicioj de i.a. la prezidantino de la Kultur-Kleriga Konsilantaro de la Zagreba Urba Asembleo, la Internacia Asocio de Pupistoj (UNIMA) kaj kvar zagrebaj gazetoj. Organizis la festivalon la Instituto por Kulturo kaj Klerigo en Zagreb, kun Junpionira Domo en Sisak (urbo najbara al Zagreb), Popoluniversitato Trešnjevka en Zagreb kaj Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb kiel kunorganizantoj.

Pupistoj el 7 landoj ludis en Esperanto

Partoprenis pupistoj el Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, F.R. Germanujo, Hungarujo, Jugoslavio, Kanado kaj Rumanujo. En du salonoj en Zagreb kaj en du lokoj en Sisak ili faris tridekon da prezentaĵoj antaŭ almenaŭ kvin mil spektantoj, kaj la televido filmis la tutan ĉeĥoslovakon prezentaĵon. Krome okazis akcepto en la urbdomo, faka kunveno pri la eduka valoro de la pupteatro, kunveno pri la Turnea Servo kaj — ne malpli fruktodona — diversaj festetoj kun eblecoj por personaj kontaktoj.

La Pupteatro de Konstanca, Rumanujo, ricevis la unuan premion de la faka juĝantaro, dum la Pupteatro de Košice, Ĉeĥoslovakujo, ricevis la premiojn de la lingva kaj de la infana juĝantaroj.

La oficialaj dokumentoj, programoj ktp. estis en Esperanto kaj en la kroata lingvo. La spektakloj estis senescepte en Esperanto. Ĉe la oficialaj kunvenoj (malfermo, akcepto ktp.) la lingvoj estis Esperanto kaj la kroata. Ĉe la fakaj kunvenoj oni uzis Esperanton kun traduko en la francan, kaj kelkaj partoprenantoj, kiuj pli malpli komprenis Esperanton sed ne bone ĝin parolis, sin esprimis en la rumana, bulgara aŭ kroata lingvo kun posta traduko.

Ĉar PIF ne estas unufoja aranĝo sed ĉiujara, ŝajnas al mi, ke raporton nepre sekvu prijuĝo. Mi la unuan fojon ĉeestis la PIF-on, kaj mi prijuĝas ĝin pli de la Esperanta ol de la pupista mondo. Ĉu, cetere, oni prizorgas, ke la diversaj trupoj en la naciaj fakaj revuoj ion skribas pri PIF? Mi menciis unue kelkajn mankojn:

1. Ne ĉiuj trupoj venis. (Kelkaj el ili pro kaŭzoj sendependaj de la organizantoj.)
2. Ne estis regularoj por la juĝantaroj.
3. En la presita programo *h* anstataŭis la supersignojn.
4. Pli da infanoj, kiuj komprenas Esperanton, devus partopreni la PIF-n.

Natura aspekto de praktikata Esperanto

Kaj jen la plusoj de mia kalkulaĵo:

1. Fakte Esperanto estas la oficiala lingvo ĉe internacia faka aranĝo, al kiu la fakuloj venas pro fakaj kaŭzoj kaj ne pro Esperanto. Principe tio ja


Aldonaj faktoj pri Zamenhof'oj

Serĉante ruslingvajn versaĵojn de Zamenhof, pri kiuj interalie menciis ankaŭ Privat en sia verko *Vivo de Zamenhof*, mi trovis en *Russkij Jevrej*, n-ro 2 de la jaro 1882, p.72 kaj en aliaj numeroj de tiu gazeto, ankaŭ en aliaj ruslingvaj judaj gazetoj jenan anoncon: "Instruisto de germana lingvo en Varsovia Reala Lernejo kaj 1-a Klasika 'Progimnazio' M. F. Zamenhof akceptas por pensio ĉe si lernantojn-judojn, vizitantajn varsoviajn lernejojn aŭ dezirantajn studi tie — Varsovio, str. Novolipie 28."

Ankaŭ en *Nedel'naja Ĥronika Vosĥoda*, n-ro 33 de la jaro 1887, p.833, mi trovis jenan notaĵon: "*Izraelita* (pollingva varsovia juda gazeto — I. D.) komunikas, ke fraŭlino Augusta Zamenhof (fratino de d-ro Zamenhof, naskita en 1864 — I. D.), fininta la studadon en unu el porvirinaj gimnazioj en Varsovio, estas enoficigita kiel instruistino de la germana lingvo en loka porvirina 'progimnazio'. Ŝi estas la unua judino, ricevinta postenon de la instruistino en niaj registaraj mezlernejoj."

Isaj Dratwer
Israelo


KIAL J.A.L. SUR




"Pasaĝeroj en japana aviadilo, kiuj atendis, ke ili eliros el ĝi sur la firman aerhavenon de San Francisco, sed kiuj anstataŭe atingis Usonon per balanciĝantaj kaŭĉukaj savboatoj, devis miregi, prefere ol rideti. Tiel konkludis enketo de la usona Nacia Konsilo por Sekureco de Transporto, en Vaŝingtono.

La aviadilo de JAL, nomita Ŝiga, elaeriĝis tute glate en la 22a de novembro, 1968 — sed 4 kilometrojn for de la aerhaveno.

Kial restis tiom da akvo inter ĝi kaj la firma tero? Tion la enketo klarigas per du kaŭzoj:



Scenoj el
(dekstre)
"Budulinĉjo"
kaj (mal-
dekstre) "La
scivola ele-
fantido" de
la Pupteatro
el Košice,
Ĉeĥo-
slovakujo.



estas nesuperebla atingo.


2. PIF povis altiri studentojn kaj aliajn junulojn al aktiva kaj praktika kunlaboro, kvankam Esperanto por ili ne estas ĉefa afero. Ni do vidas, ke homoj, kiuj "pro la bela ideo" ne lernas Esperanton, nun lernas kaj uzas ĝin, ĉar tio povas doni al ili ion — al la pupistoj partoprenon en festivaloj kaj komprenon de alilandaj spektakloj, al la studentoj gajajn festivalajn tagojn kaj novajn amikojn en multaj landoj.
3. Ankaŭ ĉe la neoficialaj kunvenoj kaj festetoj Esperanto estis dum la gaja interbabilado unu el la "grandaj" lingvoj.
4. Miloj da infanoj, instruistoj, gepatroj k.a. vidis la spektaklojn kaj tiel konatiĝis kun Esperanto en praktika uzo.
5. Ĉijare la organizanto de la festivalo estis neesperantista kultura instanco. La ĉefa forto malantaŭ la festivaloj estas Zlatko Tišljar, juna membro en Zagreb, nun dungito ĉe tiu instanco, i.a. kun la tasko aranĝi la festivalojn. Tio signifas komenciĝantan pro-

fesiigon de la laboro — sen kotizoj aŭ subvencioj de la esperantistaro!

6. PIF povas esti bazo por starigo de turnea servo, ĉar jam nun aro da teatroj pro la PIF-j havas esperantlingvajn spektaklojn, kun kiuj ili volonte faras turneojn. Realigo de tio postulas entreprenemajn kunlaborantojn en aro da landoj. Ilin oni nun serĉas.
7. PIF donas naturan okazon por menciigi Esperanton en fakrevuoj pri pupteatroj. Ekz-e aperis en la nacilingva organo de Nordlanda Pupteatra Asocio en Danujo tripaĝa artikolo pri la ĉijara PIF kaj pri la turneo de la Zagreba Pupteatro.

Mi ne povas ne konkludi, ke tiuj festivaloj meritas grandan atenton en la Esperanto-movado. Per tio ne estu dirite, ke la okazinta 3-a PIF estis tute perfekta, sed ke la metodoj kaj la ĝisnunaj rezultoj estas tiel interesaj, ke oni devus serioze pripensi 1) la eblecojn por kunlaboro kun la Turnea Servo de PIF kaj tiel vastigi la agadon sur la jam firma bazo de la festivaloj kaj 2) la eblecojn por similaj agoj sur aliaj kampoj.

MARIĜIS ?



Surprizita
DC8 de JAL
naĝas en la
golfo de San
Francisco —
parte pro
lingva
problemo!

1) La aviadistoj ne sufiĉe bone konis la aŭtomatan pilot-sistemon, kiun ili uzis.

2) La piloto, kapitano Kohei Aso, kaj la unua oficiro, kapitano Joseph Hazen, malofte parolis unu al la alia, kaj eĉ komplete silento estus eble preferinda, ĉar iliajn maloftajn interparolojn konfuzis la lingva baro.

Neniu en *Ŝiga* suferis vundon, sed necesis ŝarĝi ĉiujn 96 pasaĝerojn — senŝuaj — sur savboatojn kaj treni ilin tra la golfo de San Francisco ĝis la haveno."

El *The Advance Star*, Burlingame, Calif., 1. jul. 1970

Laste aperis . . .


unuavice poezio kaj amuzaĵoj. *Por pli bona mondo — tra poezio kaj esperanto* estas la titolo de dulingva (portugala-Esperanta) libro, 259-paĝa, de la brazilano Sylla Chaves. Ĝi enhavas: eseon pri tradukado, koncizan gramatikon de Esperanto kaj multajn poemojn originalajn kaj tradukitajn. *Eta bukedo* (1,— gld.) prezentas la poezion de itala poetino Lydia Senes en traduko de Luigi Minnaja. *Robert Burns: poemoj, kantoj kaj satiroj* estas 27-paĝa kajero kompilita de Reto Rossetti el verkoj de la skota bardo. Aperis la jam reklamita *Kruko kaj Baniko el Bervalo*, 144-paĝa kolekto da "maldecaj anekdotoj" de Louis Beaucaire. (Ilustrita, 16,— gld.) Tute deca estas la broŝuro *Gajaj klubvesperoj; skeĉoj kaj ludoj*, de G. Riisberg k.a. (2,— gld.).

Pastro J.B. Kao se-ĉien en Tajbej verkis 32-paĝan studon ĉinlingvan pri *La problemoj de universala lingvo kaj ĝia solvo*.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 12% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.



Esperanto en ĝia
jam multfoje pruvita
rolo de edzperanto:
vidu sub Britujo kaj
Jugoslavio . . .



LOKE - FAKE

Britujo

- En septembro okazis samtempa geedziĝa ceremonio de du paroj en la sama preĝejo. La sekretario de Brita Esperantista Asocio, s-ro H. Platt, edziĝis al kimrino B. Williams; kaj komitatano de UEA, s-ro R. Markarian, al japanino K. Ozawa. La pastro por la ceremonio estis ankaŭ esperantisto K. Twinn. Pluraj gazetoj raportis pri tiuj internaciaj geedziĝoj faritaj pere de la Internacia Lingvo.

Irako

- En la ĵurnalo Al-Taaĥi (29.9.1970), kun 20 000 ekz-oj da eldonkvanto, aperis artikolo pri Esperanto, verkita de s-ro Al-Amili, delegito de UEA.

Jugoslavio

- Okazis internacia geedziĝo en Subotica, en oktobro. La nova paro estas jugoslavino Magda Konya kaj itala advokato A. Corrado Stagi; ili konatiĝis unu kun la alia per korespondado en Esperanto.

Kubo

- Ampleksa artikolo pri Esperanto kaj la lingva problemo aperis en *Granma*, la oficiala organo de la centra komitato de la Komunista Partio de Kubo. (Dato: 17-a de sept. 1970; eldonnombro: 327 000.)

Rumanujo

- La tutlandan Esperantistan Renkontiĝon, okazintan en Covasna de la 29-a ĝis la 30-a de aŭgusto, partoprenis 144 personoj el 26 urboj. Ili decidis starigi landan organizaĵon sub la titolo "Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato", kies ĉefa celo estas kunordigi la agadon de Esperanto-rondoj funkciantaj ĉe kulturdomoj. Ĝis nun ne ekzistis ia landa organizaĵo en Rumanujo.

Sovetunio

- De la 1-a ĝis la 15-a de aŭgusto okazis en Baŝkir la 12-a Tendaro de Junaj Sovetaj Esperantistoj. Loĝis en la komuna tendaro proksimume 150 gejunuloj. Por la venontjara Tendaro, okazonta de la 12-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1971 en Kiev, oni jam invitis 50 15 gejunuloj el Bulgarujo, Hungarujo kaj Pollan-

do, kaj atendas partoprenantojn ankaŭ el la aliaj landoj. Informojn donas: Esperanto-Klubo, Kijevskij Politeĥniĉeskij Institut, Kiev-56, Ukrajna SSR.

FAKE

Ornitologio

- Baldaŭ aperos nova terminaro *Esperantaj nomoj de eŭropaj birdoj*, ellaborita de la nomenklatura komisiono de la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE). Ĝi entenos la nomojn de 579 specioj kaj donos por ĉiu specio nur unu nomon kontraŭ la ĝisnuna kaoso.

INFANOJ KONGRESO

Kongresejo: St. Mary's Bay School Holiday Centre, Romney March, Kent, Britujo.

Konstanta Adreso: 12-a Internacia Infankongreseto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Celo: La Infana Kongreseto, kiel konstanta institucio de la Universala Kongreso, celas eduki infanojn al internacia amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto. La kongreseto daŭrigas la ekzemplon kaj etoson de esperantistaj familioj, kiuj en la ĉiutaga vivo uzadas la Internacian Lingvon. Sed la Infankongreseto bonvenigos ne nur denaskajn esperantistojn, sed ankaŭ lernejanon, kiuj lingve bone progresis kaj kapablas partopreni en la kongreseto gvidata tute en Esperanto.

La infankongreseto estas edukejo, kie esperantistaj infanoj spertas en atmosfero de festa, sed disciplinita libereco, internacian vivon kaj solidarecon, sen iaj rasaj, naciaj, religiaj aŭ aliaj apartigoj. Ĝi celas



56-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Londono, 31.7. - 7.8. 1971

Alta Protektanto: Urbestro de Londono Sir
Peter Studd.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

"Tiom por vidi"

kaj "tiom por fari (kaj tiom por memori!) en Londono '71" heroldas la violkolora reklamilo de la 56-a UK, eldonita de LKK sur ledpapero de formato 118 x 169 mm. Senpagaj ekzempleroj por reklamaj celoj estas haveblaj ĉe UEA.

Vojaĝos karavane

Favorprezan grupvojaĝon al la kongresurbo 1971 anoncas la Esperanto-Asocio de Finnlando (S-ro Raimo Strandén, Louhentie 11 C 51, Tapiola), la Japana Esperanto-Instituto (Hongo 2-2-14, Tokio), la Turisma Fakto de Hispana Esperanto-Federacio (F-ino Inés Gastón, P. Marina Moreno, 35, 4^o dcha, Zaragoza). Apartan mencion meritas la karavano de f-ino M.H. Vermaas (Nieuwe Binnenweg 70 II, Rotterdam-3002, Nederlando), kiu proponas al la partoprenantoj allogan unusemajnan restadon antaŭ la Universala Kongreso . . . en Islando!

Dumkongresa libroservo

Komisiite de la LKK, Brita Esperantista Asocio organizos la oficialan librovendon dum la 56-a UK. Por ke ĝia provizo estu kiel eble plej kompleta kaj por la aĉetantoj varia, oni petas ĉiujn Esperanto-eldonejojn kontakti al BEA-Libroservo, 140 Holland Park Ave., London W 11, Britujo kaj eventuale proponi siajn titolojn.

Kampadejoj haveblaj, sed . . .

Kiel informas la sekretario de Brita Asocio de Esperantistaj Kampadistoj kaj Ruldomistoj, s-ro F.J. Swan (7, Brooklands Road, Cosby, Leicester, LE9 5SD), li mem estas preta aranĝi aferojn kaj doni konsilojn al tiuj, kiuj volas kampadi dum la Kongreso. Sed por rezervigi lokon en la proksima kampadejo, li devas ricevi sinanoncojn antaŭ la fino de 1970.

Statistiko (26.10.70)

Entute 235 personoj el 28 landoj.

SALUTU LA KONGRESON!

Kun plezuro la Loka Kongresa Komitato anoncas novan planon, laŭ kiu vi, kiel individuo, povos saluti la partoprenantojn de la 56-a Universala Kongreso de Esperanto. Por la unua fojo aperos en la Kongresa Libro aparta sekcio, speciale por *viaj* salutoj kaj anoncetoj. Ĉu por saluti amikojn, por informi pri via loka Esperanto-societo, aŭ eĉ por reklami vian komercon, ĉion ĉi ni oferas al vi je tre modera prezo: 10 ŝilingoj (4,35 gld) por la unua linio, t.e. ĉirkaŭ 40 literspacoj, kaj 5 ŝilingoj (2,18 gld) por ĉiu aldona linio aŭ parto de linio. Por duoble tiom, via anonco aperos ankaŭ en la Dua Bulteno kaj la Suplemento.

Bonvolu sendi viajn anoncojn kun antaŭpago al:

Loka Kongresa Komitato de la 56-a UK
(S-ro Ian Fantom), 140 Holland Park Ave.,
London W11 4UF, Britujo. Brita nacia
ĝirkonto n-ro 335 8151.

ESOS APUD LA MARO

kuraĝigi esperantistajn familiojn kaj ankaŭ geinstruistojn instrui Esperanton al la infanoj, krei kontakton inter diverslandaj gejunuloj, kiuj jam konas la lingvon kaj montri al la ekstera publiko la servojn de Esperanto por pli bona internacia kompreniĝado.

Datoj: La Infankongreseto okazos de la vendredo la 30-a de julio ĝis vendredo la 6-a de aŭgusto 1971 kun aldona libervola restado de la 6-a ĝis 13-a de aŭgusto 1971. La geknaboj rajtas partopreni en la unua aŭ ambaŭ semajnoj. La programo de ĉiu el la du semajnoj estos malsama. La principa limdato por aliĝo estas la 30-a de aprilo 1971.

Kondiĉoj: La Infana Kongreseto estas nepre rezervita al infanoj de 6 ĝis 16 jaraj, kun eventualaj esceptoj en specialaj kazoj. Infanojn kun nesufiĉa lingvoscio oni ne akceptas. Lernejoj grupoj estas akceptataj. Pro aĝodiferenco inter la partoprenantoj, la organizantoj kreas tri grupojn: infanoj 6-9-jaraj, geknaboj 10-13-jaraj kaj gejunuloj 14-16-jaraj. Tamen en la praktiko tiuj grupoj ne estos ĉiam aparte, ĉar en multaj agadoj pli gravas persona matureco ol aĝo.

Kostoj: Oni povas peti detalajn informojn de la konstanta adreso. Limigita nombro da infanoj estos invitita helpe de la fondaĵo "Adoptaj Gepatroj", precipe infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nebonstataj familioj. Tiel la organizantoj ebligas al ĉiuj partoprenantoj agrablan ferioestadon.

Kongresejo: La feria centro *St. Mary's Bay School Holiday Centre*, Romney Marsh, Kent, situas ĉe la suda marbordo de Anglujo, inter Folkestone kaj Dungeness, je 24 km de Dover. La centro disponas pri ĉio necesa por ludoj, studoj, naĝado, ekskursoj kaj por ebligi la restadon kaj okupon dum ĉia vetero. La naĝebleco en la maro estas tute proksime de la centro.

Aliĝiloj: La aliĝilojn oni petu ĉe la konstanta adreso de la Kongreseto. Al la sama adreso oni direktu la pagojn kaj ankaŭ eventualajn proponojn por aliĝpagoj per fondaĵo "Adoptaj Gepatroj". Oni bonvole notu, ke la nombro de akceptotaj infanoj estas limigita je 60.

esplorado en la se

Por industrio, la decido servi al la homaro signifas : esplori.

La okdekjara historio de la Philips-kompanio atestas pri evoluo per esplorado daŭre fosanta pli profunden por trovi la faktojn.


Ofte ŝajnis kvazaŭ oni serĉas pinglon en fojnostako. Necesis pacienco, mono, talento, energio. Sed, dank' al ili, brilaj rezultoj estas akiritaj.

Apogata de fundamenta esplorado, Philips povas servi kaj helpi la milionojn, kiuj fidele plenumas sian taskon en la mikrokosmo de familio, oficejo, laboratorio aŭ industrio.

Per mastrumaj helpiloj en la domo. Per X-radiaj kaj medicinaj aparatoj por hospitaloj. Elektroniko por la industrio. Pesticidoj por la agrikulturo. Lumigado por transportiloj. Oficejaj maŝinoj. Kie ajn homoj deziras fari servojn al aliaj, ili trovas Philips ĉe sia flanko, preta kaj kapabla provizi ilin per la iloj por servi.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.




La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips.

rvo de l'homaro



PHILIPS



TEJO

TEJO-redaktoro: Wim Jansen, Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen, Nederlando

SKOLTISMO KAJ ESPERANTO

Okaze de la ora jubileo de la Skolta Monda Oficejo

Aperis anoncoj pri korespondado en Esperanto en pluraj skoltaj gazetoj. Nomita kiel sekretario de Japana Skolta Asocio estas esperantisto s-ro Ken Fukuba. Jen du freŝaj novaĵoj, kiuj ilustras la ŝanĝigantan sintenon de la monda skolta movado favore al la Internacia Lingvo.

Kiam Robert Baden Powell, reveninte el Sud-Afriko en Britujon, fondis la skoltismon en 1907, lia intenco estis nur reeduki la britan junularon, kiun post multjara kolonia vivo, li retrovis malmulte inspirita.

La eksterordinara pedagogia metodo de Baden Powell havis tiel multe da influo kaj altira forto, ke la knaboj grandnombre alfluis. La skolta movado rapide kreskis kaj disvastiĝis en ĉiujn partojn de Britujo. Ankaŭ en la britaj kolonioj kaj la kontinento de Eŭropo, kaj eĉ ekster Eŭropo, multaj skoltaj grupoj fondiĝis.

Kiam en 1914 la unua mondmilito ekestis, centmiloj da skoltoj troviĝis en la mondo, en la kvin kontinentoj.

Tiu milito kreis novan mensan horizonton ĉe ĉiuj popoloj, kiuj aspiris al internaciaj kontaktoj. Jam en 1919 estiĝis la ideo kunvenigi skoltojn laŭeble de la tuta mondo. Naskiĝis en la jaro 1920 la unua *ĵamboreo* (sud-afrika vorto por grandega kunveno). Pli ol 8000 skoltoj partoprenis en tiu ĵamboreo, el 34 landoj, i.a. Cejlono, Hindujo, Nov-Zelando, Japanujo k.c.; kompreneble la plej granda parto el Eŭropo.

Dum tiu unua ĵamboreo, kiu okazis en Londono, la ĉefestraroj de la diversaj naciaj skoltasocioj kunvenis kaj decidis i.a. starigi internacian organizaĵon. Kaj tiel fondiĝis la Skolta Internacia Oficejo, kies nomo ŝanĝiĝis en 1954 al Skolta Monda Oficejo.

Skolta Monda Oficejo

La Skolta Monda Oficejo (S.M.O.) havas estraron de 12 elektitaj skoltaj ĉefoj, ĉiu el alia lando, kiuj formas Skoltan Mondan Komitaton. Regule parto de tiuj 12 estraranoj eksiĝas kaj novaj estas elektataj. Ĝenerala Sekretario, kun la stabo, gvidas la Oficejon laŭ la decidoj de mondaj konferencoj, kiuj okazas en ĉiu alterna jaro. La lasta konferenco okazis en 1969 en Helsinko, post la 54-a Universala Kongreso de Esperanto.

Necesus paĝoj por rakonti la laboron de la Skolta Monda Oficejo. Ni menciuj, ke en 1971 okazos en Japanujo la 23-a Konferenco kaj samtempe la 13-a ĵamboreo. La ĵamboreoj okazas nur en ĉiu kvara jaro.

La sidejo de S.M.O. estis unue en Londono ĝis 1957. Tiam ĝi iris al Ottawa kaj revenis en 1968 al Ĝenevo. La diversaj direktoroj estis: Hubert Martin (angla), John Wilson (angla), Dan Spry (kanada), Dick Lund (aganta, angla), kaj nun d-ro Laszlo Nagy (sviso hungardevena). En 1968 la titolo direktoro ŝanĝiĝis al ĝenerala sekretario.

La nombro de la landoj aliĝintaj al S.M.O. estas ĉirkaŭ 100 kun pli ol 12 000 000 da skoltoj. Kompre-

neble milionoj da homoj trapasis la vicojn de la skolta movado en la tuta mondo depost 1907.

Estas certe interese scii la sintenadon de S.M.O. al Esperanto.

En sia libro *Skoltismo por knaboj* (eldono de 1908), Baden Powell instigis la skoltojn, ke ili lernu Esperanton, kio fakte ne multe okazis. Internacie kaj oficiale la angla kaj la franca lingvoj estas la du ĉefe uzataj lingvoj.

Skoltismo kaj Esperanto

Ne mirigas, ke en 1918 britaj skoltestroj fondis SEL-n (Skolta Esperantista Ligo), kiu jubileis en 1968.

Ekde 1920 ĝis 1957 S.M.O. estis vera bastiono kontraŭ Esperanto. En oktobro 1957 Dan Spry inform-



Al la Skolta Monda Oficejo donacis novan radio-ekipaĵon la skoltoj de Japanujo. Supre, la donacon transdonas s-ro A.C. Delgado el Filipinoj. Dekstre: s-ro Laszlo Nagy, la ĝenerala sekretario de la Oficejo, fiere elmontras la emblemon de la monda skoltaro, kies originalon portis al la luno la astronautoj de Apolo 11a.

iĝis pri Esperanto kaj petis de mi longan artikolon pri skoltismo kaj Esperanto, kiun li aperigis en la oficiala organo de S.M.O. Poste ankoraŭ aperis kelkaj artikoloj.

Okaze de la 4-a ĵamboreo en Gödöllő, Hungarujo, en 1933, la hungara ĵambore-estraro akceptis Esperanton kiel la trian oficialan lingvon, sed S.M.O. malpermesis ĝin. Tamen oni uzis ĝin nur neoficiale.

En 1934 la Komitato de S.M.O. decidis ne stimuli la skoltojn lerni Esperanton "ĉar sen granda valoro". . . (kvankam la Ligo de Nacioj en 1922 eldonis favoran raporton!).

Kiam la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) fondiĝis, mi petis ĝian direktoron, d-ron Lapenna, regule sendi la CED-dokumentojn al S.M.O., kio daŭras ankoraŭ nun. Sendube la alsendo de tiuj dokumentoj impresis la tiaman direktoron D. Spry, kiu en 1957 do informiĝis pri Esperanto.

Neatendite alvenis al SEL fine de 1964 favora novaĵo: la Komitato de S.M.O., kunveninte en Luksemburgo, decidis nuligi la decidon de 1934, "ĉar Esperanto pruvis sian utilecon nun sur diversaj kampoj".

Kiam Dan Spry ekisigis, lin sekvis Dick Lund, kiu en 1918 lernis Esperanton, sed . . . forgesis pri ĝi. Tamen li restis favora.

Post la aganta direktoro Lund, sekvis d-ro L. Nagy, kiu ankaŭ lernis Esperanton dum sia diplomata kari-ero en Portugalujo. Kun li mi havis longan konversacion en Ĝenevo, kaj jam antaŭ tiu renkonto d-ro Nagy skribis en 1968: "Mi estas konvinkita, ke Esperanto havas grandan estontecon en nia movado". Ankaŭ la nuna ĉefredaktoro de la oficiala SMO-organo, Anthony Murdoch, skribis en 1968: "La uzo de Esperanto, kiel komuna lingvo, prezentas grandegajn eblecojn por la skoltoj de la tuta mondo".

Kiam en 1969 la 22-a skolta monda konferenco okazis en Helsinko, SEL donacis 150 ekzemplerojn de nia nova lernolibro *Ĵamborea Lingvo* al ĉiuj delegitaroj. Tio okazis kun la plena aprobo de la organiza komitato de la konferenco, kun Kol. Kontiopää kiel ĉefo, kiu skribis: "Mi estas konvinkita, ke via libro estos bonega kontribuo por la mondvasta agado de skoltismo".

Nun, ni staras antaŭ la 13-a ĵamboreo en 1971 en Tokio. Japanaj esperantistoj kaj skolt(estr)oj ege

klopodas uzigi Esperanton dum la ĵamboreo. Ĉu ĝi estos uzata oficiale? Ĉiukaze Esperanto povos esti uzata kiel ĉiuj aliaj naciaj lingvoj. La idealo estus: kiel oficiala lingvo! D-ro Nagy ja skribis: "Mi pensas, ke la japana ĵamboreo estus bonega okazo por varbi multajn adeptojn por tiel utila lingvo".

Kvankam Esperanto do breĉis la muron de S.M.O., ni ankoraŭ ne povas paroli pri venko. Por atingi tion, ni bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj en la mondo. Ĉiu en sia loko kontaktu kiel eble plej multe la skoltojn, ankaŭ la skoltinojn, kaj konigu nian libron *Ĵamborea Lingvo*, kun gramofondisko.

Jozef Van Gulck
Honora Prezidanto de SEL

Filmseminario de GEJ

La 14-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo pritraktos ĉi-jare la temon "La rolo de la moderna, specife mallonga filmo". Novaĵo en ĉi tiu seminario estos, ke la tradicia prelego cedis sian lokon al kelkdeko da mallongaj filmoj de plej modernaj skoloj. Estas la celo, ke post ĉiu prezento la seminarianoj diskutos pri la esencaj trajtoj de la rigardita filmo, pri la problemoj de nia socio, kiun ĝi bilde kaj sone komunikis al la publiko, ktp. Etskalaj eksperimentaj prezentadoj jam rikoltis grandan sukceson ĉe malgrandnombra publiko, kaj estas antaŭvideble, ke sama sorto trafos la ampleksan programon de la seminario!

Krom ĉi tiu unikaĵo estos la tradiciaj programeroj kiel vizito al la urbo, akcepto en urbdomo, novjaraj balo kaj ekskurso kaj . . . refoje la fonetika kurso, kiu en antaŭa seminario estis tiel alte aprezita.

Seminaria urbo estos Ulm, situanta en sudokcidenta Germanujo (FR), facile atingebla trajne kaj aŭtomobile. Por tie partopreni supre skizitan programon kaj enspiri la faman seminarian etoson vi devas tuj sendi vian aliĝilon al Uwe Joachim Moritz, Andreastrasse 57, D-5161 Merken, FR Germanujo.


KONCIZE, komuna gazeto de la belga, germana, itala, franca kaj nederlanda sekcioj de TEJO

moderna, ĉar ĝi estas ofsetita

modela, ĉar ĝi anstataŭigas nacian apartecon per internacia kunlaborado.

aktuala, ĉar ĝi aperas ĉiun duan monaton.

ABONU sendante 35 belgajn frankojn aŭ egalvaloron al pĉk 9142.70, Agnes Geelen, Floralaan 12, B-2100 Deurne, Belgujo



Ĉu Zamenhof ne estas “kreinto”?

Skribas Tadeusz Nowakowski (Polujo):

D-ro L.L. Zamenhof estis ĉiam konsiderata kiel ‘kreinto’ aŭ ‘aŭtoro’ de Esperanto. Kial do la Jarlibroj de UEA de 1969 kaj 1970 degradas d-ron Zamenhof, titolante lin ‘iniciatinto’ de Esperanto? Tio ŝajnas esti maljusta.

Respondas la redakcio:

D-ro Zamenhof mem skribis: “En tia grava afero, kiel lingvo tutmonda, la persona juĝo kaj decidoj de unu homo devas havi rolon eble plej malgrandan, ĉar unu homo sur ĉiu paŝo eraras. Unu homo tie povas esti nur iniciatoro sed ne kreanto.” (1889). Emfazi la rolon de la plurjardeka uzado de la lingvo por ĝia evoluo estas tute konforma al la ideoj de Zamenhof kaj helpas forigi la antaŭjuĝojn de multaj homoj, kiuj bone komprenas, ke unu homo sola ne povas krei kompletan lingvon maturan por absolute ĉiuj fakoj de la vivo kaj ke por vere vivi kaj kreskigi lingvon necesas aktiva uzado fare de sufiĉe granda socia grupo.

ANTAŬ 50 JAROJ

— en “Esperanto”, n-ro dec. 1920

*Jenaj frazoj estas
ĉerpitaj el raporto en la
revuo “Esperanto” pri la unua
ĝenerala kunsido de la Ligo de
Nacioj, en Ĝenevo, nov.-dec. 1920:*

La ĝeneralaj kunsidoj okazas matene je dekunua kaj daŭras kutime ĝis la dektria posttagmeze. Nur angla kaj franca lingvoj estis parolataj ĝis nun. Post ĉiu parolinto, tradukisto stariĝas kaj resumas la argumentojn en la alia lingvo. La sekretariaro ankaŭ presas ĉiujn dokumentojn angle kaj france. Kvardek-ses oficistoj laboras ĉe tiu nura fako traduka.

Post la propono de la sudamerikaj Liganoj akcepti ankaŭ la hispanan lingvon, kiu estas fakte tiu de preskaŭ la duono de la reprezentantaj regnoj (dek-ok), estis decidite, ke ĉiuj lingvoj estos permesataj kondiĉe, ke la delegitoj havigu mem sian tradukiston, escepte por francaj aŭ anglaj paroladoj, kies tradukojn la sekretariaro zorgas nure. La rezultato estis, ke neniu kuraĝis paroli hispane. La franca lingvo estas fakte la plej uzata, ofte nek tre flue, nek tre klare, sed kun la plej granda ŝanco de ĝenerala kompreno. La anglan lingvon uzas la Britoj, Kanadanoj, Aŭstralianoj, Zelandanoj, Hindoj, Sudafrikanoj, Ĉinoj, Japanoj kaj kelkaj Skandinavo. Plej ofte la franca traduko de la paroladoj anglaj estas pli ĝenerale aŭskultata ol la originalo mem, dum oni male malatentas kaj zumbruadas dum la anglaj tradukoj de francaj paroladoj.

Teknikaj ŝanĝoj en “Esperanto”

Skribas E.R. Penny (Britujo):

La oktobra numero de *Esperanto* ne plaĉas al mi. Malŝatindaj estas la malgrandaj presliteroj kaj la grizeta inko kaj la grizeta papero. La kontrasto inter la presaĵo kaj la papero ne estas sufiĉa, krom sur la kovrilaj paĝoj. Mi forte esperas, ke estontece vi povos plibonigi la kontraston, pliakrigi la literandojn kaj uzi pli grandan tiparon.

Respondas la redakcio:

Ni povas, dank’ al la foto-ofseta metodo, grandigi aŭ malgrandigi la literojn laŭdezire ĝis kiu ajn grado. Ni nur devas trovi tiun grandecon, kiu plaĉas al la plimulto el niaj legantoj. Kiel vi vidas, ekde ĉi tiu numero ni iom pligrandigis la literojn. Ili estas ankaŭ pli kontrastaj. La akrecon de la literoj, precipe de la titoloj, ni same plibonigis.

La papero, al kiu s-ro Penny riproĉas grizecon, estis en la oktobra numero precize la sama, kiel en la pli fruaj. Ekde novembro, tamen, ni uzas alian paperon (kanadan), malpli pezan kaj iom pli grizan. Tion nome necesigis la kresko de la paĝnombro: sen tiu malpli peza papero, necesus pagi ĉiujare ĉ. 7 000 gld. da ekstra afranko! Estus eble elekti alian paperon malpezan, perfekte blankan, sed tia papero estas ĉiam pli trasidebla, bedaŭrinde.

Kial ne reeldoni “ŝlosilojn”?

Skribas E.K. Osmotherly (Britujo):

Mi volas atentigi, ke ni komencas perdi unu el niaj plej utilaj informiloj, nome la ŝlosilaron. Mi ĉiam trovas, ke estas tre impresi diri — tute vere — ke, se oni skribos simplan leteron en Esperanto kaj sendos ĝin al neesperantisto kun ‘ŝlosilo’ en lia propra lingvo, li komprenos — kaj ke, se oni aldonos vortareton, li povos respondi.

Antaŭ la dua monda milito ni disponis ŝlosilojn en ĉirkaŭ 30 lingvoj. Kiom mi scias, oni nun povas ricevi ŝlosilojn nur en la albana, angla, dana, finna, germana, norvega, portugala, persa kaj sveda lingvoj.

Mi tre esperas, ke UEA prenos sur sin la taskon eldoni tiajn ŝlosilojn, kiuj nun mankas.

Respondas la redakcio:

Kelkfoje oni aŭdas diri, ke la ‘ŝlosiloj’ havas malbonan efikon, ĉar ili kreas la impreson, ke la tuta lingvo estas lernebla el kelkpaĝa broŝureto. Tio, laŭdire, kaŭzas postan elreviĝon. Aliaj, kontraŭe, trovas ilin valoregaj. Kion diras pri tio niaj aliaj legantoj?

Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la novembran eldonon.

Svisa Radio. Kelkaj ŝanĝoj okazis pri ondlongoj: 1) ĉiuj programoj estas ankaŭ disaŭdigataj per ondo 75.28 m (3985 kcs); 2) ĵaŭde kaj sabate ondo 31.28 m (9590 kcs) estas uzata anstataŭ 19.44 m (15430 kcs). Ĉiuj aliaj indikoj publikigitaj en la tabelo de la novembra revuo restas validaj.

Pola Radio. La matena programo estas disaŭdigata de 5.00 h ĝis 5.30 h per ondoj 200 m, 49 m, 41 m; la posttagmeza programo de 15.30 h ĝis 16.00 h per ondoj 31 m, 25 m, 19 m.

Esperanto-anguletoj en nacilingvaj programoj de la Pola Radio estas aŭdeblaj: 1) ĉiutage (escepte dimanĉe) en la germanlingva programo je 13.00 h per ondoj 200 m, 49 m, 31 m, 25 m; 2) marde en la svedlingva programo je 17.00, 19.00, 22.00 h, per ondoj 200 m, 49 m; 3) dimanĉe en la danlingva programo je 16.30 h per ondoj 200 m, 49 m, 41 m.

Aŭskultantoj bonvolu atenti kaj noti la multnombrajn ŝanĝojn pri horoj, tagoj kaj ondlongoj; leteroj al la redakcio de Pola Radio estos pli utilaj por la daŭrigo de tiuj "anguletoj", ol iam.

Nova konkurso "Polaj produktoj en la mondo" estas anoncata; respondoj estas atendataj ĝis la 31-a de decembro. Informfolio estas ricevebla de Pola Radio, Esperanto-fako, Varsovio, Pollando. Vojaĝo al Pollando kaj multaj aliaj premioj estas gajneblaj.

NEKROLOGOJ

M. MINNAERT

Forpasis prof-o d-ro M. Minnaert, direktoro de la Observatorio Sonnenborgh en Utrecht (Nederlando). Kiel sunspecialisto, li eldonis dulingvan (angla-Esperantan) atlason de sunaj spektroj kaj laboris por la astronomia fakterminologia komisiono de la Internacia Scienca Asocio Esperantista.

PALMYRE DE COCK

Forpasis P. De Cock, delegitino de UEA ekde la jaro 1949 por Aalst, Belgujo.

VERNON JOSEPH LECK

Mortis la 16an de aŭgusto Vernon Joseph Leck, dumviva membro de UEA. Inter la jaroj 1939 kaj 1946 li estis la ĉefdelegito por Nov-Zelando, kaj ankaŭ en sia loko Wellington li aktivis kiel la prezidanto de la loka klubo dum multaj jaroj. De 1935 ĝis la finiĝo de la dua monda milito, li redaktis la gazeton *La interna ideo*.

ELEKTO DE KOMITATANOJ B

*Atentigo al
ĉefdelegitoj
kaj delegitoj*

Laŭ decido de la Komitato de UEA farita en Vieno, en 1971 okazos novaj elektoj, interalie ankaŭ de komitatanoj B. Ilia oficperiodo komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Londono.

Laŭ la Statuto kaj Regularoj de UEA (senpage riceveblaj de la Centra Oficejo) la elekto de komitatanoj B okazas jene: —

"La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo . . . unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon." (Statuto, art. 25). "Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu Komitatanano B. Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtas al plia Komitatano B." "Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribi konsenti al sia kandidatiĝo." (Ĝenerala Regularo, art. 28). "Povas esti elektita kiel komitatano . . . nur persono, kiu estis Membro-Abonanto de UEA almenaŭ dum la 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj." (art. 30). "Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj." (Statuto, art. 25).

En la momento de redakto (nome, antaŭ la fino de 1970) la nombro de elekteblaj komitatanoj B ankoraŭ ne estas certa, ĉar ĝin fiksos la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj je la 31-a de decembro. Antaŭvideble, tamen, la nombro estos ĉirkaŭ ses. La direktoro de la Centra Oficejo petas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj **antaŭ la 1-a de februaro 1971**. La proponantoj bonvolu zorgi, ke la kandidatiĝoj estu konformaj al la Statuto kaj Regularoj, kaj ke ili atingu la Centran Oficejon (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) antaŭ la indikita dato.

Post la forpaso de la fiksita dato, se la nombro de kandidatoj superos tiun de elektotaj komitatanoj B, la direktoro voĉdonigos ĉiujn ĉefdelegitojn kaj delegitojn, kiuj rajtas voĉdoni. Pri la rezulto aperos informo en la gazeto.

KOREKTO

En recenzo pri *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* (oktobro, p. 154) ni skribis: *Sed kelko da anglismaj vortoj . . . prefere estu rekonsiderata en la dua eldono*. Ni deziras korekti tiun esprimon, klarigante, ke la kritiko aludis ne iajn anglismojn — tiajn ni ne trovis — sed kelkajn neologismojn, plejparte jurajn, enkondukitajn surbaze de kelkaj lingvoj, i.a. de la angla uzado. Ni pardonpetas pro la malĝusta esprimo.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 440, 1 novembro 1970

USONO ĈE LA PINTO

Usono estas la lando, en kiu UEA gajnas la plej grandan nombron da novaj individuaj membroj. El 610 tute novaj individuaj membroj aliĝintaj en la periodo de novembro 1969 ĝis novembro 1970, 71 estis en Usono. Sekvas laŭvice: Francujo (58), Britujo (50), Japanujo (45) kaj Finnlando (42).

Se oni kalkulas proporcie al la nombro de membroj en la koncerna lando, tiam staras ĉe la pinto Grekujo, Hungarujo kaj Japanujo. En Grekujo aliĝis nur 14 novaj membroj, sed la sumo saltis je 58% kompare kun la antaŭa jaro.

Krom la tute novaj membroj, ĉiujare remembris grava nombro da malnovaj membroj, kiuj ial interrompis la membrecon.

PERANTO ANKAŬ EN KUBO

UEA ĵus nomis Peranton en Kubo, kie malfermiĝis tre favoraj perspektivoj por Esperanto pro la iniciato de la ministerio pri edukado. Li estas la prezidanto de la grupo en Ciego de Avila, s-ro Pedro Pablo Lamas-Díaz. Adreso: Apartado 223, Ciego de Avila, Camagüey, Kubo. Tiu paŝo signifas, ke UEA nun jam havas oficialajn kotizperantojn en 8 latinamerikaj landoj.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de februaro neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Antiloj: E.N. Mulders, Oranjestad. **Britujo:** David E. Kelso, Freuchie. **Francujo:** Pierre Royer, Antony; Gérard Mougel, Cornimont; Marcel Bosc, Dieppe; Georges Villeneuve, Eaubonne; Jean Dettwiller, Echiroilles; Albert Cnudde, Meylan; Jacques Manceau, St-Avoid. **F.R. Germanujo:** Johannes Grundkötter, Landau; Rudolf Helmke, Soest; Ingrid Maier (JD), Truchelfingen; Richard Hoppe (FD), Wiesbaden. **Hispanujo:** José M. Claramunt, Calella; Santos Arranz (FD), Madrid. **Hungarujo:** Béla Nagy, Oroszlány. **Irlando:** Christopher Fettes (FD), Dublin. **Italujo:** Clemente Daglio (FD), Vescovato. **Japanujo:** Oohaŝi Jasuji, Iwata. **Jugoslavio:** Antun Zima, Varaždin. **Kubo:** P.P. Lamas Díaz, Ciego de Avila. **Nederlando:** Jacobus Tuinder (FD), Heemskerk; Jan van Doorn, Weert. **Norvegujo:** Vigdis Kvalvaag, Stavanger. **Pollando:** P.M. Kańczyk (VD), A. Pawlicki (VD), Chorzów; Aleksander Grela (FD), Nowy Sącz; Henriko Paruzel, Zabrze. **Sovetunio:** Antanas Poška, Vilnius. **Svedujo:** Ivar Nilsson (VD), Umeå. **Svislando:** Maria Grünig (FD), Bern. **Usono:** Richard E. Wood, Baton Rouge; A. Scott Aleshire, Berkeley;

Marion Hall, Charleston; Robert Davis, Greenbelt; Elizabeth Rankin (FD), Redwood City; Gigi Harabagiu (FD), San Francisco; Dorothy Holland (FD), Roy Holland (FD), Santa Barbara.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1970)

Aŭstrujo: Kaltenleutgeben; Linz (FD dentotekniko); Pottschach; Wien (VD Rentmeister). **Belgujo:** Aalst; Bruselo (FD ekonomio); St. Gilles-Dendermonde. **Britujo:** Helensburgh; Southampton (FD skoltismo); Weston-super-Mare. **Ĉeĥoslovakio:** Praha (FD inventaĵoj). **Finnlando:** Helsinki (FD SOS-aŭtoservo). **Francujo:** Gargenville. **F.R. Germanujo:** Ansbach (FD religio); Fürstfeldbruck; Neunkirchen. **Hispanujo:** Barcelona (FD filatelo), (FD turismo); Villanueva y Geltrú. **Israelo:** Haifa. **Kanado:** Haultain; Toronto (FD radio). **Pollando:** Piekary. **Svislando:** Genève. **Usono:** College Park; Highland Park; Maywood; Newark; Philadelphia (JD); Washington (FD agrokulturo).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kuhn, f-ino Johanna, Leimersheim, F.R. Germ. Lipphardt, f-ino D., Landstuhl, F.R. Germ. Ovilo Arranz, s-ro J.L.P., Madrid, Hispanujo. Rössler, f-ino Irmgard, St. Martin, F.R. Germ. Sona, s-ro Manfred, Neustadt, F.R. Germanujo. Wood, prof. Richard, Baton Rouge, Usono.

MEMBRO-SUBTENANTO 1970

249 Lokna, s-ro J., Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1971

1 Hubalek, s-ro J.; 2 Zeller, s-ro H., Aŭstrujo. 3 Epstein, s-ro F., F.R. Germanujo.

DONACOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: Britujo: prof-o I. Lapenna, 90,—. F.R. Germanujo: d-ro H. Wehrheim, 100,—. Ĉijare entute 556,08 gld.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: (por la presejo) Germanujo: IBM-Sindelfingen, 97,50. Ĉijare entute 3108,17 gld. krom 8484,27 gld. por la presejo.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100,— gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.) 1 S-ro E. Carlén, Svedujo. 2 Prof-o I. Lapenna, Britujo. 3 S-ro E.L.M. Wensing, Nederlando. 4 S-ro E.J. Woessink, Nederlando.

Patrono A de TEJO: Usono: s-ro E.C. Pollock.

Por TEJO: Kongresanoj en Vieno: 156,80 gld. Ĉijare entute 345,20 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

En mia kolekto mankas ankoraŭ multaj libroj de naciaj kongresoj de Esperanto. Kiu povos helpi min? Ramon Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

En 1963 faldfolioj pri Hastings, Anglujo, estis amase dissenditaj al naciaj esperantistaj organizaĵoj kaj aliaj. Kiu retenis ilin kaj povas resendi? Skribu al Ken Hadler, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Bonega apudmara gastdomo estas "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo, 70 kilometroj de Dovro. Intencantaj longrestantaj en Britujo kongresanoj skribu por detaloj.

Mi deziras interŝanĝi aŭ aĉeti ŝakpecarojn de la tuta mondo. J.D. Goulding, Retriever Lodge, Tudor Close, Seaford, Sussex, Britujo.

Vendataj. Revuo "Esperanto", Jarkolektoj 1919-1930, "Oficiala Gazeto Esperantista", jarkolektoj 1-6, kompletaj kolektoj de "La Praktiko" kaj "Norda Prismo". Turnu vin al Roger Iserentant, B-8000 Brugge, Kerklaan 61, Belgujo.

En la lingvoj angla, franca, germana, hispana, portugala kaj rusa la sveda Radio jam disaŭdigas. Skribu, proponante programojn en Esperanto por la tuta mondo. Jen la adreso: Radio de Svedio, Eksterlanda Redakcio, S-105 10 Stokholmo. Ne forgesu mencii, ke "INTER — Agadgrupo por Esperanto" petis vin skribi. (Anonco represota en naciaj Esp.-organoj.)

Esperanto-programita, instrumaterialo por germanlingvanoj (4 programkajeroj, 4 diskoj, informa broŝuro) nur 20 gmk. aŭ kontraŭvaloron de 25 gmk. per novaj Esperanto-libroj. Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1 E, FR Germanujo.

Kampadistoj! Certe ankaŭ vi spertis, ke mankas al la Esperanto-movado grupo, kiu konsistas el kampadistoj, ĉu ne? Ĉu ni kune fondu ĝin? Skribu tuj al: D. Andersen, Lindevangshusene 56, DK-2630 Tåstrup, Danlando.

Mi korespondas pri Esperanto-literaturo, ankaŭ la malnova, se eblas, aĉetas kaj interŝanĝas rarajn esperanto-librojn. S-ro Arne Bengtsson, Åbybergsgatan 32, 431 31 Möhndal, Svedlando.

ANON



CETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Tutmonda korespondado (Esperante, france, angle). Sendu foton, aĝon, konatajn lingvojn. Revuo kun centoj da adresoj kaj fotoj. Mondklubo "PARIS 2000", B.P. 379, Paris (R.P.), Francujo.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn ĉefe kun fraŭlinoj. Mehmet Telyakar, Aydinlik Sok. No. 23, Ortakoy, Istanbul, Turkujo.

Institucio Hodler 68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: F-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

**F-ino Jindra
Řeháková.
Vidu ĉi-sube.**

Juna E-instruistino, gimnazia studentino, serĉas gekorespondemulojn por si, siaj samaĝaj koleginoj kaj 11-15-jaraj kursaninoj. Bv. skribi al f-ino Jindra Řeháková, str. Smetanova, Mělník, Ĉeĥoslovakio.

Korespondadon serĉas, prefere kun instruistoj el okcidentaj landoj, William Mock, DDR-2861 Below, Tannenweg 3, DR Germanujo.

Geamantoj de legado — la Libroservo de UEA posedas kelkajn librojn, kiuj, kvankam en bone legebla stato, havas difektetojn, ekz. iom ĉifitajn aŭ sunpaligitajn kovrilojn. Jen ni ofertas al vi (*ink. kutimajn sendkostojn*):

La bela subtera mondo, 6,— (normale 7,40);
Italaj rakontoj, 1,60 (normale 2,10);
Kanako el Kananam, 6,— (normale 8,—);
Kiel akvo de l' rivero (broŝ.), 9,— (normale 11,40);
Nepalo malfermas la pordon, 8,— (normale 11,10);
Nur tri kolorojn, 2,75 (normale 3,80);
Ombroj de la kvara dimensio, 4,— (normale 5,70);
Reeĥoj, 2,75 (normale 3,80);
Sen eliro / La respektima P. . ., 4,50 (normale 6,10);
Songê sub pomarbo, 5,— (normale 6,60);
Sub la jugo, 8,— (normale 10,—);
Utila manlibro pri Hindujo, 3,75 (normale 5,—).

Kvantoj estas severe limigitaj. (Por mendoj celitaj al nederlandaj adresoj aldoniĝas 4%.)

KORESPONDEMULOJ

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!



La lasta manuskripto de d-ro Zamenhof

H.C. ANDERSEN

F A B E L O J

(IV-a volumo)

Tradukis d-ro L.L. Zamenhof

53 originalaj desegnaĵoj de

A. Uniechowski

244 paĝoj

Prezo: 3 us. dol. (42 steloj)

(Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon en valoro de 0,30 us. dol. por aĉeto de "Fabeloj, vol. I".)

Eldonis: Heroldo de Esperanto

13 rue de la Reinette (Pippelingstr.),
B 1000 Bruselo.

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe UEA

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 49 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo


- 18 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: \$ 4,50 (62 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1


Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska



GLUSTELO

Gluebla sur
aŭtomobiloj ktp.
Formato: 12 x 9 cm.
Prezo: nur 0,90 gld.
Mendu ĉe Libroservo de UEA

ESPERANTO



Universala Esperanta Stenografio.
Lernolibro por memlernado
aperis sub la aspicioj de UEA kaj
de EKI.
(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).
Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

Komerca PELTISTO

Samideano SHERWOOD

sendas BONDEZIROJN

por la NOVA JARO

al Samideanaj AMIKOJ

en la TUTA MONDO!

Fakdelegito pri Peltoj KARL L. SHERWOOD,
2717 Curtis Drive, Amarillo, Texas 79109, Usono

Se la vivo ĝis nun tedis vin – ne malesperu!

Ĉar nun aperis:

LOUIS BEAUCAIRE

Kruko kaj Baniko el Bervalo

Maldecaj anekdotoj

por neprudaj

legantoj



160 paĝoj – humuraĵoj – ilustraĵoj

Mendu ĉe via libroservo – se ĝi kuraĝas vendi!
Prezo: 16,- ndl. gld. aŭ 33,- d. kr. (plus sendkostoj)

Pagu al:

Eldonejo TK, Ystadvej 11, DK-2850 Naerum.

Dana poŝtĉekkonto 7 95 58

Germana poŝtĉekkonto Hamburg 36 17

Nederlanda poŝtĉekkonto 1806731

aŭ petu nin sendi poŝtrepage.



Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Dumonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de U.E.A.

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300).

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO- FONDAJO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj.

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4 — 48100 Ravenna (Italujo).

SINTAKSO! Jen la ŝlosilo
por regi la lingvon.

PERFEKTIGA KURSO

Plena Traktato pri la Sintakso

dediĉita al tiuj, kiuj
deziras koni ĝisfunde,
paroli korekte kaj
skribi perfekte
ĉies lingvon.

200 paĝoj, 15 x 22 cm.
Prezo: 5 usonaj dolaroj
(Pago al Buenos Aires)

Daniel Quarello

C.C. 47, Suc. 13, B.

Bajreso, BUENOS AIRES
(Argentino)